


LA JUNIA VIVO



REDAKCIO KAJ
ADMINISTRADO:
LIMMEN (N. H.)
NEDERLANDO

ĜIRONUMERO
209354 NEDERL.

JARABONO:
NEDERLANDO:
0,80 GULDENO
ALIAJ LANDOJ:
16 FR.FR.; 0,70 DOL.; 2,15 V.FR.

MONATA ORGANO POR LA JUNULARO KAJ KOMENCANTOJ

Por progresintoj.

ONKLO RUBEN.

Estis iam, antaŭ preskaŭ 80 jaroj, malgranda knabo, kiu ludis turbon sur la placo. La nomo de la malgranda knabo estis Ruben. Li estis nur trijara, sed li svingis la vipeton tiel brave, ke oni devis ĝoji pri tio.

Tiu tagon, antaŭ okdek jaroj, estis bela printempa vetero. La monato marto jam venis, kaj la urbo konsistis el du partoj : unu blanka kaj varma, kie regis la sunlumo kaj unu malvarma kaj malhela, kie estis ombro.

Nun okazis, ke la malgranda knabo laciĝis kaj serĉis ripozejon. Ĉiu domo posedis ŝtonperonon. Ruben ne povis imagi ion pli taŭgan. Li estis bubeto skrupula, kaj malklare sciatis, ke la patrino ne volas, ke li sidu sur la perono de fremduloj. Tial li eksidis sur la propran ŝtonperonon, ĉar ankaŭ ili loĝis ĉe la placo. Tiu perono estis en la ombro, kaj estis tie tre malvarme. La knabeto fermis la okulojn kaj ekdormis. Kiam li vekigis, li sentis sin terure malagrabla. Plorante li eniris, kaj la patrino vidis, ke li malsanas. Si enlitigis lin. Kaj post kelkaj tagoj la knabeto mortis. Sed per tio ne finiĝis lia historio.

Lia patrino ekfunebriis lin el la fundo de 'l koro, per tia funebro, kiu spitas jarojn kaj morton. Si havis ankoraŭ aliajn infanojn, do multaj zorgoj okupis ŝin. Tamen restis ĉiam loko en ŝia menso, kie ŝia filo Ruben povis loĝi. Por ŝi li ne estis morta. Li restis konstante viva. Sendube neniu el la vivantaj infanoj de la patrino ĉeestis tiele en ŝiaj pensoj kiel la mortinta.

Kelkajn jarojn post sia morto Ruben ricevis fratineton. Kiam ĉi

tiu havis tiom da jaroj, ke ŝi povis ludi sur la placo, okazis, ke ankaŭ ŝi eksidis por ripozi sur la ŝtonperono. Sed la patrino sentis sommomente, kvazaŭ iu ektiras ŝian jupon. Ŝi eliris, kaj tiel malmilde prenis kaj levis la fratineton, ke ĉi tiu memoris tion dum sia tuta vivo. Kaj eĉ malpli ŝi forgesis kiel stranga estis la vizaĝo de la patrino, kaj kiel tremis ŝia voĉo, kiam ŝi diris : „Ĉu vi scias, ke vi iam havis frateton, kies nomo estis Ruben ? Li mortis, ĉar li malvarmumis sur ĉi tiu ŝtonperono. Vi ne volas formorti de via patrino, Berta, ĉu?”

Frato Ruben baldaŭ fariĝis same viva al siaj fratoj kaj fratinoj kiel al sia patrino. Kiam ili vidis iun sidi sur ŝtonperono aŭ ŝtonbalustrado aŭ ŝtono ĉe la vojrandoj, tuj ili sentis pikon en la koro kaj pensis pri frato Ruben.

Kiam la gefratoj parolis pri si, ili plej alte taksis fraton Ruben. Ĉar ĉiu el ili ja sciis, ke ili faras al la patrino multan penon. Ili ne povis kredi, ke la patrino multe funebros, se iu el ili mortus. Sed fraton Ruben ŝi efektive funebras, do ja estas certe, ke li estis multe pli bona ol ili! Tamen ili nur sciis pri li, ke li ludis turbon, kaj malvarmumis sur ŝtonperono. Sed li ja certe estis mirinda, se la patrino tiom amas lin!

Mirinda li vere estis : li faris al la patrino plej da ĝojo el ĉiuj ŝiaj infanoj. Ŝi vidviniĝis, kaj laboris en mizero. Sed kiam la infanoj vidis ŝiajn larmojn, ili ĉiam opiniis, ke la patrino ploras, ĉar ili ne estas tiaj, kia frato Ruben. Baldaŭ naskiĝis en ili ĉiam pli forta emo, konkuri kun la malgranda mortinto pri la amo de la patrino. Ĉion ili volus fari por la patrino, nur por ke ŝi amu ilin tiom, kiom lin. Kaj pro tiu dezirego mi opinias Ruben la plej utila el ĉiuj infanoj de la patrino. Ili plenkreskis kaj fariĝis bravaj homoj. Ili havigis al si riĉon kaj reputacion, dum frato Ruben nur sidis senmove sur sia ŝtonperono. Sed li estis tamen antaŭe. Li estis neatingebla.

Kaj ĉe ĉiu progreso, eĉ kiam ili fine povis havigi al la patrino bonstaton, por ili devis esti sufiĉa rekompenco, ke la patrino diris: „Ho, se mia Ruben povus vidi ĉi tion!”

Frato Ruben akompanis la patrinon tra la tuta vivo, ĝis la lito de la morto. Eĉ tiam ridetis la patrino, ĉar ŝi iris por renkonti Ruben.

Sed eĉ tiam ne finiĝis la historio de la malgranda Ruben. Al ĉiuj siaj gefratoj li fariĝis simbolo pri la laborplena vivo de la hejmo, pri la amo al la patrino, pri ĉiuj kortuŝaj memoroj el la jaroj de peno kaj malprospero. Estis ĉiam io varma kaj bela en iliaj voĉoj,

kiam ili parolis pri li. Estis festo kaj soleno ĉirkaŭ la trijarulo. Tiel okazis, ke li enŝoviĝis ankaŭ en la vivon de siaj genevoj. La patrino amo faris el li grandulon, kaj la granduloj — ili efikas kaj influas de generacio al generacio.

Fratino Berta havis filon, kiu ofte devis interrilati kun onklo Ruben. Li havis kvar jarojn, kiam li sidis sur la rando de la trotuaro, kaj rigardis malsupren en la defluejon. Naĝis tie pajleroj kaj fojneroj kun aventuraj turnmovoj laŭ la profunda akvovojo. La etulo rigardis kun dolĉa trankvilo, kiun oni sentas observante la aventuran ekzistadon de aliaj, estante mem en rifuĝejo. Sed lia patrino interrompis lian paceman filozofiadon. Kiam ŝi vidis lin, ŝi sammomente devis pensi pri la hejma ŝtonperono kaj pri la frato. „Ho, kara mia eta knabo,” ŝi diris, „ne sidu tiel! Ĉu vi scias, ke via panjo havis malgrandan fraton, kiu nomiĝis Ruben kaj havis kvar jarojn, same kiel nun vi. Li mortis, ĉar li eksidis sur la randon de la trotuaro, kaj malvarmumis.”

Al la etulo ne plaĉis tiu ĝeno. Li restis sur la trotuaro kaj daŭrigis sian filozofiadon, dum liaj blondaj, krispaj haroj malsuprenfalis ĝis liaj okuloj. Tiam fratino Berta faris ion, kion ŝi ne farus pro iu alia. Pro frato Ruben ŝi sufiĉe malmilde skuis sian malgrandan filon. Kaj tiel li eklernis respekton al Onklo Ruben.

Alian fojon la blondbuklan knabeto estis sur la glacio, kaj malica bubo puŝrenversis lin. Ĉar la patrino estis en la apudeco, la knabeto restis sidanta sur la glacio, laŭte plorante, por montri, kiom maljuste oni traktis lin. Sed li forgesis, ke lia patrino ĉefe estas la fratino de onklo Ruben. Kiam ŝi vidis Akselon sidi sur la glacio, ŝi venis tute ne konsole, sed kun la ĉiama : „Ne sidu tiel, mia eta knabo! Pensu pri onklo Ruben, kiu mortis, kiam li havis kvin jarojn, kiel nun vi, ĉar li eksidis en la neĝon!” La knabo tuj ekstaris, kiam li aŭdis pri onklo Ruben, sed li sentis malvarmon ĝis en la koro. Kiel Panjo povas babilu pri onklo Ruben, kiam ŝia knabo tiom malĝojas? Tiu sidiĝu por morti, kie ajn al li plaĉas, Aksel ne kontraŭas, sed nun estas, kvazaŭ tiu mortinto volus forpreni de li lian propran panjon, kaj tion Aksel ne povas toleri. Tiel li lernis malami onklon Ruben.

Alte supre en la ŝtuparejo de la hejmo de Aksel troviĝis ŝtonbalustrado, kie estis tre rave sidi. Aksel nomis tiun balustradon „La bona trotulo Grane”. Sidante tie li multe fantaziis, kaj sentis sin heroo. Sed kompreneble ankaŭ tien venis onklo Ruben. Subite li aŭdis krivoki la vartistinon : „Aksel, ne sidu tie! Pensu pri onklo

Ruben, kiu mortis, kiam li havis ok jarojn, kiel nun Aksel, ĉar li rajdis sur ŝtonapogilo! Ĉi tie Aksel neniam plu sidu!"

Kia enviema stultulaĉo, tiu onklo Ruben! Li ŝajne ne toleras, ke Aksel mortigas drakojn kaj savas principojn! Se li ne gardos sin, Aksel montros, ke ankaŭ li povas gajni gloron. Se li saltus mal-supren sur la ŝtonplankon, kaj mortigus sin, li certe superbrilus tiun mensogiston!

Kompatinda onklo Ruben! Kompatinda malgranda bona knabo, kiu ekstere sur la sunluma placo iam ludis turbon! Nun li spertis, kion signifas esti granda homo. Birdotimigilo li faraĝis, kiun la tempo estinta, montras al la tempo estonta.

Aksel estis kun multaj gekuzoj en la belega bieno de onklo Ivan. Li iris tien plena de sia malamo al sia granda onklo Ruben. Li nur volis scii, ĉu tiu ankaŭ turmentas la aliajn. Sed estis io, kio malebligis al li demandi. Estis, kvazaŭ li blasfemus. Fine la infanoj restis solaj. Neniu plenaĝulo ĉeestis. Tiam Aksel demandis, ĉu ili aŭdis pri onklo Ruben. Li vidis, ke ekfulmas en la okuloj, kaj ke pugniĝas multaj manetoj. Sed montriĝis, ke la malgrandaj buŝetoj lernis respekton al onklo Ruben. „Silentu, pro ĉio en la mondo!" kriis la tuta infanaro.

„Ne," diris Aksel, „nun mi volas scii, ĉu estas iu alia, kiun li turmentas, ĉar mi opinias, ke li estas la plej ĝena el ĉiuj onkloj."

Tiu sola kuraĝa vorto rompis la digon, kiu ĉirkaŭis la indignon de la infankoroj. Ekestis granda bruo kaj vokado. Oni redaktis la pekaron de la kompatinda eminentulo. Onklo Ruben persekutas ĉiujn genevojn. Onklo Ruben mortas, kie ajn al li plaĉas. Onklo Ruben estas ĉiam samaĝa kiel tiu, kiun li volas ĝeni. Kaj respekton oni devas havi al li, kvankam li estas mensogulo. Nur en la plej silenta fundo de la koro oni rajtas lin malami. Kian mienon la grandaĝuloj faras, kiam ili parolas pri li! Ĉu li do iam faris ion rimarkindan? Eksidi por morti ja ne estas io mirinda! Kiajn ajn grandfarojn li plenumis, li nun certe misuzas sian potencon. Li kontraŭas al ĉio, kio estas agrabla al la infanoj. Li pelas ilin de la tagmeza dormo en la verda herbo. Li ektrovis la plej bonan kaŝejon en la parko kaj malpermesis ĝian uzon. Ili ĉiuj estis certaj pri tio, ke la kompatindulo neniam havis pli ol tri jarojn. Kaj nun li atakas grandajn dekkvarulojn kaj asertas, ke li havas ilian aĝon. Tio estis el ĉio la plej ĉagrena afero.

Nekredeblajn aferojn oni rakontis pri li. Sed ĉiuj infanoj ne dubis

pri tio, ke ne estas rifuĝejo, for de lia turmentado. Oni ne povis ribeli kontraŭ onklo Ruben.

Oni ne volus kredi tion, sed kiam ĉi tiuj geknaboj estis plenaĝuloj, kaj ricevis proprajn infanojn, ili komencis utiligi onklon Ruben, kiel faris antaŭ ili la gepatroj. Kaj iliaj infanoj, t. e. la nun kreskantaj gejunuloj, siaflanke bone lernis la lecionon. Okazis, ke kvinjara bubeto iras al la maljuna avino Berta, kiu eksidis sur ŝtupon de la perono por atendi la veturilon, kaj diris al ŝi : „Avino, vi havis foje fraton, kiu nomiĝis Ruben.”

„Pri tio vi estas prava, mia knabeto,” diris la avino, kaj tuj ekstaris.

Tio multe impresis ĉiujn gejunulojn. Ili ekkomprenis, ke onklo Ruben devas ĉiam resti granda, kiel ajn neĝuste oni uzas lin, nur tial, ĉar li estis tiom amata.

En la nunaj tagoj, kiam oni tiel detale ekzamenas ĉian grandecon, oni devas uzi lin pli modere ol antaŭe. La limo de lia aĝo estas pli malalta, herbon, arbojn kaj boatojn li lasas, sed nenio el ŝtono, kio taŭgas por sidado, povas eviti lin.

Kaj la infanoj de la nuna tempo kondukas alie kontraŭ li ol la gepatroj. Ili kritikis lin malsekrete kaj malkaŝe. Iliaj gepatroj ne plu kapablas blinde obeiigi ilin. Malgrandaj knabinoj de supera lernejo debatas onklon Ruben kaj demandas, ĉu li estas io alia ol mito. Sesjara junulo proponas, ke oni per eksperimentoj pruvu, ke estas neeble morte malvarmumi sur ŝtonperono. Sed tio estas nur taga modo. En la interno de la koro ĉi tiu generacio estas same konvinkita pri la grandeco de onklo Ruben kiel la antaŭaj, kaj obeas lin, kiel ili. La tago venos, kiam ĉi tiuj mokuloj pilgrimos al la gepatra hejmo, elserĉos la malnovan ŝtonperonon kaj starigos ĝin sur soklon kun ora surskribaĵo. Ili nun dum kelkaj jaroj ŝercas pri onklo Ruben, sed tuj kiam ili estos plenkreskaj kaj ricevis proprajn infanojn por eduki, ili komprenos la utilon kaj neceson de la granda homo.

„Ho, mia eta infano, ne sidu sur tiu ŝtonperono! La patrino de via patrino havis onklon, kiu nomiĝis Ruben. Li mortis, en via aĝo, ĉar li eksidis por ripozi sur tia ŝtonperono.”

Tiel oni diros, tiel longe kiel daŭros la mondo.

Adapte laŭ la rakonto de Selma Lageröf
en „Nevideblaj Katenoj”.

Atentu la adresŝanĝigon de „La Juna Vivo”.

LA JUNA VIVO EN „LA JUNA VIVO”

Harelbeke, 1-a de majo 1939.

Dimanĉon la 25an de aprilo mi renkontis S.ron Rainson en Bruselo kaj kune ni iris al Tervuren. Ni vizitis kun S.ro Noë (la prezidanto de la esp. grupo en Tervuren) diversajn ejojn kaj la kampterenon, kiuj estos je nia dispono dum la junularkunveno. S.ro Noë kaj mi faris grandan bicikladon tra la bela, vasta parko laŭlonge de la lagoj. Belega estas la ĉirkaŭaĵo. Mi multe ĝuis. Vere mi opinias, ke ni povos projekti belajn kaj interesajn promenadojn tra la parko kaj arbaro. Tie la freŝa aero estas tre saniga. Efektive ni elektis la plej belan kaj taŭgan lokon en Belgio por nia internacia junularkunveno!

Mi regule interriltas kun S.ro el Antverpeno, kiu estas tre fervora esperantisto, kaj kiu multe interesiĝas pri T. J. O. Jen kion li i. a. skribis al mi :

„Mi iĝas „simpatianto” de tiu eminenta kaj simpatia movado, kiu pli bone ol multaj belaj servoj kaj organizoj vere efikos por Esperanto.”

„Mi opinias la ideon de T.J.O. tute ĝinda kaj tre utila por Esperanto, kies estonteco ja troviĝas ĉe la junuloj.”

„La T.J.O.-semajno en Tervuren fariĝos kompreneble sukceso. Sufiĉas ja firme deziri tion kaj la revo realiĝos. La metodo estas sufiĉe simpla kaj reala. Kaj plue restas la fakto, ke ni estas esperantistoj : esperi estas nia metio, kaj estas tute agrabla metio!”

Ĉu li ne estas idealisto? Renkonti tiajn homojn vere kuraĝigas min. Li demandis min : „Ĉu ne eblas verki flandran artikolon pri T.J.O. por aperigi ĝin en „De Dag” (tre konata ilustrita gazeto)? Mi volonte akceptis, kaj eĉ demandis, ĉu ne eblas daŭre propagandi en tiu gazeto por la junularkunveno en Tervuren. Bone!! Hieraŭ jam aperis la unua artikolo pri T.J.O. Aliaj baldaŭ sekvos. Mi esperas, ke tio ankaŭ estos bonefika laboro...

Parto el letero de nia ĉefperantino en Belgio,
Denis Decavele.

Pensetoj de simplulo.

...Ni esperantistoj batalas por ideo, kiu enhavas ĉion, kion la mondo malhavas. Ne nur lingvanoj ni estas, kvankam Esperanto estas la fundamento sur kiu ni konstruas. La lingvo havas spiritan

flankon, kiu garantias ĝian evoluon. Esperanto bazas sur la plej altaj kaj sanktaj idealoj, kiuj estas la gvidsteloj de la homoj dum jarmiloj, ekde la komenco.

Ni estu fortaj. Ni aktive faru la devon laŭ fortoj, kapabloj kaj okazoj. La nuboj estu minacantoj, tamen ni scias, ke la vintro, kiu katenas la bonvolojn kaj malhelpas la floradon de la floroj de la ideoj, malaperos dank' al la energio, faroj kaj entuziasmo de la verdaj batalantoj. Neniam la Zamenhofa idealo estis pli aktuala ol hodiaŭ, kiam la kontraŭaj ideoj estas adorataj. Tio estu nia forto.

Svedio.

EDE,

...Dum nia migrado tra la mondo mi konstatis, ke ĉie kaj ĉie, eĉ en la plej kaŝistaj vilaĝoj en ĉiuj landoj, estas Esperantistoj. Tre bedaŭrinde mi konstatis, ke la plimulto estas esperantistoj nur laŭ ununura senco : Multaj eklernis la lingvon, sin nomas esperantistoj, sed fakte ili nur estas „esperantintoj”, ĉar ili ne abonas gazetojn, ne legas librojn, ne partoprenas klubkunvenojn, ne aktivis. Unuvorte, ili estas mortaj en la Esperanto-movado, kaj la mortintoj ne plu estas kalkulataj en la vivo.

Hispanujo (Decembro 1936).

De nia kara amiko Justo Estan.

Kie li estas?

...Dum la pasintaj semajnoj okazis revolucio en nia lando. Tamen ĝi ne estis sanga revolucio, sed nur revolucio en nia metodo de vivo. La devigan militservadon, kiu dum tiom longa tempo apartenis al la kontinentaj landoj nun ankaŭ Anglio aplikas. Kaj ja oni povas senti la okazintaĵon tra la tuta lando. Kiam komence la ĵurnaloj alportis al ni la sciigon pri la aplikado de tiu sistemo, ni sentis doloron en la koro. Kaj poste, kiam oni eldonis leĝoproponon pri la militservo, ni aŭdis nur konjektojn kaj ideojn pri la eventuala aĝo. Kun la publikigo de tiu novaĵo venis feliĉo kaj doloro. La gepatroj de tiuj, kiuj ne estas inter la aĝo 20-21 estis feliĉaj, ankaŭ la junuloj mem, sed por tiuj inter la du aĝoj la nigraj nuboj amasiĝis kaj rifuzis foriri. Ĉar la afero estas tiel „fremda” al niaj junuloj, ili ne povas kompreni kio okazis al ili, kaj la ideo de forpreno de la libereco, eĉ dum kelka tempo, ne estas bonvena. Sed kion fari? La parlamentanoj decidas, la popolo cedas.

Leighton-Buzzard (Angl.).

J. W. Holland.

„La Signifo de Hodiaŭa Novaĵo”.

La tagaj novaĵoj informas nin pri la kreskanta malamo kaj malĝojo, kiuj ekzistas inter homoj en ĉiuj landoj. Verĉe, Esperantistoj havas pezan respondecon pri ĉi tiuj aferoj.

La diversaj lingvoj en la mondo estas potenca barilo kontraŭ la proksimiĝo de bonvolo kaj paco. Ni, kies fido kaj espero restas sur la internacia lingvo, havas la povon trarompi ĉi tiujn barilojn. Nuntempe la ondoj de miskompreno kaj malamo forte frapas sur la pordo de tiu, kiu gardas la plej bonajn idealojn de l' vivo.

Kie estas tiu, kiu ne spertas timon pri la estonteco, kiam li legas la novaĵojn pri la stato de la mondo?

Zamenhof skribis : „En la mondon venis nova sento, tra la mondo iras forta voko.” Ni, esperantistoj, portas en niaj manoj la standardon de l' frateco de la homoj. Kiam ni povas frakasi la barilojn de l' universala miskompreno, tiam, eble, ni povos tuŝi la korojn kaj mensojn de la gefratoj trans la maro.

Kiam ni legas la hodiaŭan novaĵojn, ni neniam forgesu, ke super ĉio Zamenhof penis montri per siaj vivo kaj verkoj, ke Esperanto estas potenca kaj vivanta ilo por enkonduki en la mondon la fratecon de la homoj. Ni havas la povon por helpi. Ni ĝin uzu!

Bristol (Angl.).

E. Bagg (lernanto de S.ro Tordoff).

NE TIMIGU MIN PER TONDRO.

El J. Bunin.

- | | |
|---|---|
| 1. Ne timigu min per tondro —
Furiozo de l' natur', —
Post la ŝtormo des pli bele
Helas ĉarmo de lazur'. | 2. Post la ŝtormo renoviĝas
La beleco de kolor'
Kaj pli dolĉe, pli alloge
Bonodoras juna flor'. |
| 3. Tamen tremas mi pro l' grizo
De la kota veteraĉ',
Ke la vivo pasos vane
En konstanta fia klaĉ', | 4. Ke forpasos vivaj fortoj
Sen laboro, sen batal'
Kaj por ĉiam ŝirmos sunon
Vivnebullo de fatal'. |

El : B. Giedra : „Violetoj”.

Tre simplaj ekzercoj por tiuj, kiuj nur mallonge studis.

Mia rakonto.

En Germanujo loĝas mia sola fratino. Ŝi estas esperantistino. Ankaŭ ŝia edzo estas esperantisto. Ilia hejmlingvo estas do esperanto. Kaj tio estas amuza, kiel ilia dujara filineto jam parolas en tiu lingvo. La vortoj estas foje tro malfacilaj aŭ tro longaj por ŝi. Sed tio okazas ankaŭ en aliaj lingvoj, ĉu ne?

En tiu ĉi somero mi estos ĉe ili dum kelkaj semajnoj. Mi jam ĝojas aŭdi, kiel mia malgranda nevino parolas en nia lingvo.

Mia fratino skribis : „Vi miros, kiel rapide la esperanto-vortoj fluas el ŝia buŝeto, vortoj, kiuj estas tre malfacilaj por viaj lernantoj!”

Jes... sed mia fratino forgesas, ke la gepatroj de miaj lernantoj ne estas esperantistoj!!

M. v. E.

Letero el Francio.

Mi revenas de mia libertempo. Gazetoj kaj leteroj venis en tiu tempo. Sur unu letero estas fremdaj poŝtmarkoj: francaj. De kie kaj de kiu venis la letero? Ĝi estas de hispana ekssoldato, kiu batalis por la hispana respubliko. Li nun estas en Sud-Francio en la koncentrejo Saint-Cyprien. Ĉu li skribas en la hispana lingvo? Ne, li skribas en esperanto. Li rakontas en la letero, kiel ili vivas tie. Ili dormas sur la tero; domoj aŭ barakoj ne estas. Iliaj riĉaĵoj estas : kelkaj vestoj, kelkaj libroj, kraĵonoj, paperoj... ne pli. Mono mankas.

Li esperas, ke la esperantistoj el aliaj landoj volas helpi. Ĉu ni helpos al Francese Miro Pomares kaj liaj kamaradoj?

Kiu skribis al mi dum mia foresto? Kio estis sur la letero? Ĉu oni skribis al mi en la hispana lingvo? Ĉu la homoj en la koncentrejo estas riĉaj? Kiajn posedaĵojn ili havas? Kiel ili vivas? Kio mankas al ili?

Tasko : Kopiu kaj traduku la ekzercojn. Post kelkaj tagoj retraduku ilin en vian gepatran lingvon. Provu rakonti la enhavon per propraj vortoj.

LUDO.

Ĉiuj partoprenantoj ricevas papereton kaj skribas sur ĝin nomon de iu objekto aŭ besto. La falditajn paperetojn oni kolektas kaj miksas. Unu el la partoprenantoj prenas papereton, legas „sian temon” kaj paroladas pri ĝi, ekz. per minimume 5 frazoj. Tiel ĉiu partoprenanto havas la parolvicon.

Por komencantoj.**Kion mi vidis per miaj propraj okuloj.**

Antaŭ nelonge multe da homoj paŝis tien kaj reen sur unu el la ĉefaj stratoj en Bristol. Ili ĉiuj aspektis tre okupitaj kaj atentemaj pri siaj propraj aferoj, kaj neniu rigardis malriĉan, maljunan violoniston, kiu ludis sian muzikilon sur la trotuaro.

Li estis kompatinda spektaklo, kun sia longa hararo, eluzitaj ĉapelo kaj ŝuoj, kaj ĉifona vesto.

Subite, io kortuŝa okazis. Unu el la kordoj sur la violono rompiĝis. La maljuna viro senhelpe ĉirkaŭrigardis. Homamaso kolektiĝis kaj multaj ridis kaj mokis pri li. Sed ĝuste tiam okazis io, kio hontigis ilin. Tre eleganta sinjoro paŝis antaŭen, prenis la violonon, elpoŝigis-skatoleton kaj prenis el ĝi belan, novan kordon. Li rapide metis la kordon sur la violonon, redonis ĝin al la viro, kaj silente foriris.

La violonisto ne plu povis vidi sian amikon, ĉar liaj okuloj pleniĝis per larmoj dum li denove komencis ludi sian instrumenton.

Bristol (Brit.). Doris B. Dixon (lernanto de S.ro Tordoff).

Instruisto : Se mi enmetu mian manon en vian poŝon, kaj prenu el ĝi 5 din., kiel vi nomus min?

Lernanto : Sorĉisto, instruisto.

Litovaj Proverboj.

Naŭ metioj — la deka malsato.

Ĉie la pano kun krusto.

Fremda felajo ne varmigas.

Eĉ koko en sia korto estas kuraĝa.

Nur malbona konscienco timas.

Homo kreskas nur elinterne.

El „Litova Stelo”.

Muta Almozulo.

Por veki pli da kompato almozulo faris, kvazaŭ li estus muta. Junulo, kiu konis la trompulon, foje iris al li kaj demandis, dum li prenis sian monujon : „Kiom da tempo vi jam estas muta?”

„De mia infanaĝo,” respondis la almozulo.

Litovujo.

J. Sirtautas.

Spirito-ĉeesto.

Ĉar kalifo Hudŝadso estis eksterordinare kruela, liaj subuloj tre timis kaj malamis lin. Tamen li ofte vagis sola, kaj sen ia signo pri sia alta rango.

Iam li renkontis araban. Ili interparolis, kaj la kalifo demandis interalie : „Diru, amiko, kia homo estas la kalifo? Oni rakontas tion da malbono pri li...”

„Hudŝadso estas tigo,” respondis la viro, „monstro, kiu ne indas la nomon „homo”.

„Tio estas akra diraĵo.” opiniis la kalifo. „Eble estus malfacile por vi, pruvi tiun aserton!”

„La pruvon,” respondis la arabo, „vi povas trovi en la tuta lando. Se vi tion deziras, ĉiu el liaj subuloj povas rakonti vin pri liaj kruelaĵoj.”

„Ĉu vi iam vidis la kalifon?”

„Ne, kaj mi tute ne deziras tion.”

„Tamen vi nun vidas lin, vole ne vole. Kaj, pli grave por vi, vi parolas kun li!”

La arabo eĉ ne momenton embarasiĝis. Tute kviete li demandis : „Kaj ĉu vi scias, kiu mi estas?”

„Ne,” respondis la kalifo, „sed mi tre scivolas aŭdi tion.”

„Mi apartenas al la gento de la zabairoj,” diris la viro, kaj ĉiu zabairo devas dum unu tago jare rakonti ŝercaĵojn. Hodiaŭ estas mia tago.”

La kalifo admiris ĉi tiun maloftan spirito-ĉeeston kaj lasis la araban libere foriri.

Respondu al jenaj demandoj.

Kia estis kalifo Hudŝadso? Ĉu liaj subuloj amis lin? Ĉu oni ĉiam rekonis lin kiel kalifon? Kio iam okazis? Ĉu la arabo tuj rekonis la kalifon? Pri kiu informiĝis Hudŝadso? Kion diris la arabo pri la kalifo? Ĉu la diraĵo plaĉis al la kalifo? Kion li diris? Ĉu la arabo iam antaŭe vidis la kalifon? Ĉu li deziris vidi lin? Ĉu la arabo embarasiĝis, kiam li aŭdis, kun kiu li parolas? Kiel li savis sin? Ĉu liaj vortoj plaĉis el la kalifo? Kion li faris?

Tasko :

1. Kopiu kaj traduku la rakontojn en la rubriko „Por komencantoj”.
2. Laŭtleĝu la tutan rubrikon.
3. Rakontu per propraj vortoj la enhavon de „Kion mi vidis per propraj okuloj”.
4. Lernu parkere la mallongajn anekdotojn kaj la litovajn proverbojn.

La abonantoj, kies abono finiĝos je 1 julio, atentu la sciigon pri lotumado inter frupagintoj je paĝo 176. (La dato sur la koverto indikas la finiĝon de via abonjaro).



komunikoj

Tutmonda Junularorganizo.

Adresoj :

Sekretario : S.ro F. Meydam, Lingestraat 11, Leerdam, Ned.

Kasisto : M. v. d. Horst, Johan Idastr. 32, Rotterdam. Giro 330139.

Filmservo : S.ro Schut, Koedijk (N.H.). Giro 310334.

Por Anglujo : J. W. Holland, 61 Vandyke Rd., Leighton-Buzzard, Beds.

Red. „La Peranto” kaj „De Esperantist” : Meent 35, Leerdam, Ned.

Korespondiloj : La plej facila metodo por propagandi nian organizon estas fari tion per via korespondado. T.J.O. jam eldonis por tio : **kovertojn**, kun surskribo „Tutmonda Junular-Organizo”, 100 por 60 c.; **poŝtpaperon**, same, 100 por 60 c.; **poŝtkartojn**, sur la adresflanko desegno de Jekke van Dijk, prezo 10 por 10 c. (1 resp. kup.), 100 por 80 c.; **glumarkon** en la formo de la T.J.O.-emblemo, 100 por 20 c. Por konatigi al vi niajn korespondilojn ni kunmetis „T.J.O.-paketon”, enhavanta 5 kovertojn, 5 foliojn, 2 nigre ilustritajn poŝtkartojn, 5 verde il. poŝtk., 25 glumarkojn. Prezo nur 25 c. (2 resp. kup.). Mendebla al la sekr. en Leerdam.

„**De Esperantist**” : La dua numero de nia holandlingva propagandorgano aperis. Kiel la antaŭan fojon la enhavo estas tre varia. I. a. ĝi enhavas esperantokursojn por komencantoj.

Geamikoj, enkonduku esperanton en la nederlandajn hejmojn! Vigle kolportadu nian gazeton! Se vi ankoraŭ ne konas ĝin, tiam petu senpagan specimenon kaj mendilon de la red., Meent 35, Leerdam, Ned. La prezo estas por kolportantoj 2 cendoj po numero. Vendoprezo po 5 cendoj.

Flago : Per lotumado ni akiris monon por T.J.O.-flago. Jekke van Dijk jam faris la projekton, kaj kelkaj T.J.O.-anoj kudros ĝin. Kelkaj T.J.O.-grupoj jam havas flagon, kaj aliaj promesis fari iun. Estas bonega propagando! En Tervuren ni havu multajn belajn tukojn! Ĉiu grupo kunprenu Flagon! Niaj T.J.O.-desegnistoj : Jekke v. Dijk, Rauwerd, Floor Meydam, Leerdam, kaj S.ro Bartoŝik, Burghstr. 1, Eindhoven, certe pretas fari projekton!

T.J.O.-sekcio : La 9-an de majo kunvenis kelkaj roterdamaj T.J.O.-anoj por fondi sekcion de T.J.O. Oni decidis, ke la membroj pagu kotizon de almenaŭ 10 cendoj monate. La sekcio nombras 26 membrojn. Adr. sekretariino: F.-ino R. v. Vlaardingen, Nobelstr. 51b, Rotterdam, C. Plue oni decidis aranĝi Esp.-kursojn por infanoj kaj renkontiĝojn por la membroj. Ĉiuj havas la intencon multe labori por nia nova sekcio.

Kaskontrolo : Ni deklaras, ke ni kontrolis la kaslibrojn kaj havaĵon de T. J. O. kaj trovis ĉion en bona ordo.

Rotterdamo, la 18an de aprilo '39.

L. v. Vlaardingen,

M. Seilberger.

ESPERANTO SEMAJNO SUR „HERZBERG”, ASP AARGAU, SVISLANDO. 5-a ĝis 12-a de aŭgusto '39. Plena pensio en la popolaltlernejo 26-35 fr.; kotizo 10 sv. fr. Loĝado en la apuda Junulargastejo aŭ en propra tendo estas ebla. Petu informojn de W. Kobelt, Landstr., St. Margreth Kt. G. Svislando.



INTERNACIA JUNULARKUNVENO

TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO.

Tervuren (7-14 aŭg.)

Por la internacia kunveno jam anoncis sin proksimume 250 partoprenontoj. De la komunumestraro de Tervuren ni ricevis la sciigon, ke estos dormlokoj por 400 personoj.

S.ro Rainson ankaŭ skribis, ke la teatra salono (nia konversacia ĉambrego) estas tre granda. Ni do zorgu, ke niaj gastigantoj estu kontentaj. Tio signifas, ke la nombro de partoprenantoj iom post iom kresku ĝis 400!

Jam kelkaj grupoj kaj personoj sendis punktojn por la ĝenerala programo. Espereble ni baldaŭ ricevos ĉiujn programerojn, tiam en la julia numero aperos la plena programo. Ankaŭ liston pri bezonaĵoj ni presigos en la julian numeron.

Kvara listo da partoprenontoj :

Anglaj junulinoj : 81. Silven Williams (13-j.), Henwaun Bungalow, Seven Sisters, Kimrujo; 82. Ivy Hooper, Mary St., Seven Sisters, Kimrujo; 83. Betty Blakeburn; 84. Allison Boothroyd; 85. Olive Challenger; 86. Lydia Collins; 87. Patricia Davison; 88. Betty Gray; 89. Irene Mothersdale; 90. Dorothea Oats; 91. Maisie Smith (ĉiuj 15-jaraj); 92. Betty Askew; 93. Winifred Laine; 94. Joyce Maughan; 95. Elsie Proud; 96. Myrtle Reid; 97. Mary Trotter (ĉiuj 12-jaraj). Gvidantinoj : 98. F.ino Jessie Rowlandson; 99. F.ino Amy Edwards, Girls County School, Bishop Auckland. Jen la nomoj de la grupo el Birmingham, kiun ni jam menciis en „L.J.V.” No 9 : Vera Bell (18-j.); Marjorie Johnson (18); Erleen Peplow (18); Brenda Cooter (16); Erna Goode (12); Marion James (14); Violet Hodgetts (19); Kathleen Lewis (15); Edna Maynard (19); Lily Maynard (15); Margorie Ward (21); Enid Plant (14); Gvidantinoj : F.inoj Jesie Gatbrarh, Ivy Birds; S.ino M. Goode.

Anglaj junuloj : 100. Clifford Mallin (18); 101. Trevor Simpson (19); 102. Roy Hemming (19); 103. Harry Pree (19); 104. Gvidanto S.ro Allan Barne-cutt. Ĉiuj el Bourneville. Verŝajne venos ankaŭ 15 knaboj el Robert Gordon's College, Aberdeen, Skotlando.

Nederlandaj junulinoj : 105. Trien Klok (19), Burgerbrug (N.H.); 106. Ma Rens (15), Burgerbrug (N.H.); 107. Annie Vos, Burgerbrug (N.H.); 108. Annie Wardenaar (17), Haringhuizen, Gem. Barsingerhorn; 109. Corrie Reiling, Wemeldinge; 110. Jannie Bliet, Wemeldinge; 111. gvidantino F.ino Gnirrep, Wemeldinge; 112. Dikki Key (14), L. Dwarsstr. 38, Gouda; 113. Willy Idema (14), Lindeweg 7, Gouda; 114. Lena Kok (14), Middelburg; 115. Gr. Swan, Boschweg, 't Zand (N.H.); 116. Jannie v. d. Oord, 't Zand (N.H.); 117. Corrie de Leeuw, 't Zand (N.H.); 118. Femmie Kroon, Jan Oldenburglaan, Bergen (N.H.); 119. S. Smids, Karnemelksloot 197, Gouda; 120. Lucie Woudenberg (16), Hildegondestr. 25, Bussum; 121. Janny van Leeuwen (15), Pieter de Raadstr. 28, Rotterdam; 122. R. Damiaans, Groet; 123. V. Kuiper, Groet (N.H.).

Nederlandaj junuloj : 124. Job Kars, Meent 35, Leerdam; 125. Leen Ortelee, Wemeldinge; 126. Floor Meydam, Lingestr. 11, Leerdam; 127. Piet Uvenhoven, Zwaardstr. 13, Haarlem; 128. W. Vermeylen, Vorstmanstr. 41, Gouda; 129. P. v. d. Star, Botstr. 108, Gouda; 130. B. Buurman, Gouda; 131. P. v. d. Berg, Gouda, Karnemelksloot 141; 132. Gvidanto A. Dijkstra, L. Dwarsstr. 34, Gouda; 133. J. v. Hengel, Gein Noord 70, Abcoude; 134. Ant. Minderhoud (13), Middelburg; 135. Jan de Dreu (13), Middelburg; 136. Maarten Leegwater, West-Grafdijk (N.H.); 137. G. Schoen, Noorderpad, Z. O. Beemster (N.H.); 138. D. Blonk, Gouda; 139. M. v. Lienden, Lekstr. 25b, Leerdam; 140. Gvidantoj : Y. v. d. Schaaf, Tjerk Hiddestr. 28, Leeuwarden; 141-142 : Ges.roj Kaptein, Akerdijk 230, Badhoevedorp, Haarlemmermeer.

Bulgarinoj : 143. S.ino Jahn-Atanasova; 144. Marina Jahn.

Germanino : 145. F.ino Kloeveborn.

Ĉeĥoj : 146. S.ino Burgler-Jezsó; 147. K. Burgler.

Financa raporto.

Restadkostoĵ : J. v. H. en Abcoude : f 3,50; F.ino E. en Bishop Auckland : £ 7-7-5; F.ino R. en Seven Sisters : f 47,21; S.ro v. d. S. en Leeuwarden : f 7; F.ino N. T. en Stompetoren : f. 3,50; S.ro W. J. S., F.ino T. S.; S.ro J. P. G., en Koedijk : f 10,50; F.inoj M. M. kaj E. M. en Besançon : f 6,85; Ges.roj K. en Badhoevedorp : f 14; B. W. en W. Grafdijk : f 3,50; F. J. en W. Grafdijk : f 7; G. B. en Starnmeer : f 3,50; L. K., A. J. M., J. de D, F.ino E. K. en Middelburg : f 14; J. v. d. O., G. S., C. de L. en 't Zand : f 10,50; P. v. d. S., W. V., P. v. d. B., B. B., W. I., D. K., A. D., en Gouda : f 24,50; M. v. L. en Schiedam : f 3,50; J. v. L. en Rotterdam : f 3,50; F. M. en Leerdam : f 3,50; J. L. en Breskens : f 3,50; R. D., V. K., B. R., F. W., C. W., I. G., en Groet : f 32,50; G. v. A., K. d. H., A. B., N. K., fam. v. V., N. K., en West-Grafdijk : f 63; G. R. en IJzendijke : f 3,50; D. B. en Gouda : f 3,50; L. W. en Bussum : f 3,50.

Vojaĝkostoĵ : P. v. d. S., W. V., P. v. d. B., D. B., en Gouda : f 8; K. d. H., A. B., N. K., en W. Grafdijk : f 7.

Senpage al Tervuren. Iu samideanino aranĝas konkurson inter nederlandaj gejunuloj (10-18 jaraj) : Kiu antaŭ 1 julio sendas al la red. de „L.J.V.” la plej bonan verkaĵon povos senpage viziti la Junularkunvenon en Tervuren. La temo estas libera. La nura kondiĉo estas, ke la verkaĵo estu verkita esperantlingve.

Kantado. La plej bela parto de la programo en Groet estis la komuna kantado. Studu do bone la kantojn el la „L.J.V.”-kantaro! (prezo por partoprenontoj en la Int. kunveno nur po 20 cendoj).

T.J.O.-ano! Ĉiu partoprenanto estu ano de Tutmonda Junular-Organizo! Kiam la rubriko jam estis preta, anoncis sin ankoraŭ grupoj el Koedijk, Frislando kaj Leiden. La nomojn ni publikigos en la venonta numero.

7. ENIGMOJ

1 ■ ■	2 ■ ■	
	3 ■ ■	4 ■ ■

1, 2, 3, 4 estas duliteraj silaboj.

1 2 estas manĝaĵo.

2 3 estas birdo.

3 4 estas parto de l' kropo.

1 3 4 estas birdo.

Inter la gustaj solvintoj ni lotumos 2 premiojn. Ni akceptos solvojn ĝis 1 aŭgusto 1939.

La solvoj el No 9.

Horizontale : 1. junularkunvenoj; 7. ar; 8. ee; 11. ne; 13. uro; 14. arom'; 16. alk; 17. la; 19. rat; 20 as; 21. ar; 22. orumitaj altaĵoj.

Vertikale : 1. januaro; 2. rano; 3. kremo; 4. neŭtral; 5. vespert; 6. junuloj; 9. noktu; 10. balai; 12. ili; 15. rast.

La premiojn gajnis : S.ino Luyting-Vos v. Zon en Zd. Scharwopde (Ned.) kaj S.ro Chasseriaud en Royan (Franc.).

ANONCETOJ.

ESPERANTO-DOMO en ARNHEM, Esperanto-laan 3. Esperanto-kurso por komencantoj (17-22 julio '39. Internacia perfektiga kurso (24-39 Julio). Seminario por Cseh-metodaj instruistoj (31 julio-5 aŭgusto). Vizito de dana karavano (29 julio-5 aŭgusto). Kurso pri la personeco de Zamenhof (7-12 aŭgusto). Kurso de moderna korp-kulturo (7-12 aŭgusto). Oni petu informojn al Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstr. 72, Den Haag

SKRIBA KURSO POR A KAJ B (nur por holandlingvanoj). Tre detala B-kurso. — Gvidanto S. Aarse. Petu senpagan prospekton. Ĉiu kandidato sukcesis. „La Verda Stelo”, Weesperzijde 3, p/a Nieveld, Amsterdam.

„LA JUNA VIVO”, BINDITAJ JARKOLEKTOJ. Belaspektaj libroj, riĉa enhavo (belegaj rakontoj de la plej konataj verkistoj, ŝercoj, anekdotoj, kantoj, enigmaj, ktp.). Prezo nur po 35 c. plus afranko.

AL BERN. La vojaĝoficejo de „LEEN” organizas karavanon al la kongreso. Petu informojn al v. Tuyl Serooskerkenplein 33, Amsterdam.

ESPERANTO. 10-taga internacia restado lagborda en RY POPOLA ALTLERNEJO, inter Aarhus kaj Silkeborg, Danlando, 1/8-11/8 1939. Petu informojn al H. Grönborg, Rosenvej 8, Risskov St. El Ned., Franc. kaj Belgujo oni plej malmultekoste vojaĝas per la karavano de Leeuwarden. Informojn donas S.ro Kat, Spoorstr. 142, Leeuwarden (Ned.).

Propagandisto. Aŭstra pacbatalanto faras propagandvojaĝon. La 18-an de junio li venos al Nederlando, kaj deziras paroli en kiom eble plej multaj grupoj. Skribu al „La Juna Vivo” Limmen.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en jaro senpagan korespondadreson, ne pli grandan ol du linioj.

Anglujo : 21-jara S.ro dez. kor. kun geamikoj en ĉiuj landoj pri monto-grimpado. Skribu al : E. Hollowell, 71 Red Post Hill, London, S.E. 24.

Nederlando (korekto) : P. Uvenhoven, 15-j. knabo, Zwaardst. 13, Haarlem, serĉas knabon en Belgujo por kune pasigi la somerferion.

Nederlando : 15 geknaboj, 12-14-j., kiuj partoprenos la T.J.O.-kongreson en Tervuren, nun jam koresponde dez. interkonatiĝi kun eksterl. gepartoprenantoj. Skribu al la gvidanto : S.ro H. J. Schut, Instruisto, Koedijk (N.H.)

Nederlando : S.ro J. v. Wijgerden, Nieuwstr. 35, Leerdam, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝanĝas poŝtmarkojn. Respondo certa.

Nederlando : G. Raes, 16-j. studanto, IJzendijke, Ponte, dez. kor. kun knabinoj, kiuj ankaŭ vizitos Tervuren. Ankaŭ interŝ. pm. Sendu 50 aŭ pli.

Usono : „Amikaro”, Esp. Klubo, dez. kor. Skribu al la sekretario : F.ino Ivono Stevens, 1041 Chancery Lane, Meadville, Pa.

Anglujo : Urĝe bezonas landajn Skolt-gazetojn, Esp.-aĵojn, el ĉ. l. por propagandi inter skoltoj, Pastro E. N. Thomas, 18 Tithe Barn Rd. Stafford.

Nederlando : La malsanul-kurso en Juliana-Oord (Sanatorio) petas ĉiun en la tuta mondo pri esperantaĵoj por studi kaj legi. Sendu al : Cor Salemink, Sanatorio Juliana-Oord, Laren (N.H.).

Usono : F.ino Alice H. Lapidge, 103-15, 121 St. Richmond Hill, N. Y., serĉas korespondantojn por siaj 30 geĉernantoj, 12-15 jaraj.

Anglujo : Altlernejaj knaboj (16-18 jaraj), dez. kor. kun gejunuloj de ĉ. l. S.ro H. Bell, 25, St. Michaels Park, Bristol 2.

Francujo : Studento, 12-jara junulo, dez. kor. kun ĉ. l. Respondo certa. Bartoloméo Roger, Ecole supérieure de garçons, Aix-en-Provence.

Anglujo : 16 j. junulo dez. kor. kun gejunuloj, kiuj iros al Tervuren. Certa resp. W. M. Kennedy, Eason's, Radley College, Abingdon, Berks.

LOTUMADO.

Ankaŭ ĉijare ni organizas lotumadon inter la frupagintoj. Ĉiu abonanto, kies abono finiĝas je 1 julio, kaj kiu antaŭ tiu dato pagis sian kotizon por la nova abonjaro, havas la ŝancon gajni belan esperanto-verkon. Jen la premioj: Fudamenta Krestomatio, D.ro Zamenhof; Lingvaj Respondoj, D.ro Zamenhof; Vartejoj, N. Bartelmes; Colombo, Prosper Mérimée; Ellernu (progresna kurso de Esperanto), D.ro Szilágyi; Kudlago, la malgranda Eskimo; La Najtingalo, Esp.-ista kantaro; „Flirto Esperanta” (Esperanto-ludo); binditaj jarkolektoj „La Juna Vivo”; kantaroj; lernolibretoj.

Ankaŭ novaj abonantoj, kiuj pagis sian kotizon antaŭ 1 julio rajtas partopreni. (Oni atentu la daton sur la koverto, ĝi indikas la finiĝon de la abonjaro).

PAGU DO VIAN KOTIZON ANTAŬ 1 JULIO 1939.